
読経は何のため？

Por kia legi sutrojn?

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

私の僧侶としての活動の大半は、門徒さんのお宅のお内仏で読経することにあてられています。具体的には、毎月の命日参り（月忌法要）、祥月命日の法要、年忌法要が中心です。みなさんもおそらく、僧侶を招いて法要を依頼されたことがおありでしょう。（ただし月忌法要は、地域の習慣で、行わないところもある。）

ところで、この読経というのは、何のために行うのでしょうか？一般的には、「死者の幸福を願って読経してもらう」という理解が多いのではないかと思います。少し仏教を知っている人は「読経は追善供養のため」と答えられるかも知れません。またシニカルな人なら、「死んだ人にお経を聞かせても分かりやしないんだからムダ」と考えるかも知れません。

聞いた話ですが、ある地域では「お経さん食らわたる」という言い方があるそうです。お経は亡者の食べ物だと信じられているようです。こういうところでは、お経はモノになりはててしまっているのでしょうか。それ以上に、生者の亡者に対する傲慢さを感じられて、たいへん嫌な気持ちになりました。

私としては、死んだ人に聞かせるためにお経を読んでいるつもりはないのです。お経とはブツダやブツダの後継者たちの教えです。ですから、それを

Mian agadon kiel bonzon okupas plejparte sutrolegado antaŭ Budha altaro ĉe laikaj kredantoj. Konkrete, servo memore al mortotago en ĉiu monato, en ĉiu jaro kaj speciale en ĉiu kvina jaro. Certe ankaŭ vi iam invitis bonzon plenumi tian servon, ĉu ne? (ĉiumonata servo ne estas kutima en kelkaj regionoj.)

Nu, por kio ni faras sutrolegadon? Laŭ mia observo, ĝenerala kompreno de japanoj estas, ke oni petas bonzon legi sutron por la feliĉo de mortintoj. Tiuj, kiuj havas iomete da scioj pri budhismo, eble respondas, ke sutrolegado estas bono far de vivantoj anstataŭ de mortintoj kaj tiel akumulitaj bonoj utilas al mortintoj. Cinikuloj eble opinias, ke mortintoj jam ne povas aŭdi sutron kaj tial sutrolegado estas sensenca.

Iam mi aŭdis, ke en iu regiono estas la esprimo "manĝigi sutron al mortintoj". Tie oni kredas, ke sutro estas manĝaĵo de mortintoj. Tie sub tiu ĉi kredo sutro jam enfalis en materialon, do ilon de materiala vivo de mortintoj. Plie mi sentis naŭzon, kiam mi aŭdis tiun ĉi esprimon, ĉar de ĝi mi flaris orgojlon de vivantoj al mortintoj.

Mi mem legas sutron ne por aŭdigi ĝin al mortintoj. Sutro estas sankta instruo de la Budho kaj de liaj heredantoj. Tial

読むということは、とりもなおさず、その教えをお参りされている方々ともども、我が身にいただくということになります。ともに聞かせていただくわけです。よく、「お経をあげる」という言い方を耳にしますが、ほんとうは「あげる」のではなく「いただく」と言うべきでしょう。ブツダの教えを聞かせていただくのです。亡き人から私に、教えに出あうことが願われている、というべきでしょう。

お経を読むのは僧侶のしごとだと考えている人も多いでしょう。時々、自宅に僧侶を招きながら、「勝手に読んでね」とばかりに、自分は別の部屋でよそ事をしている人がいますが、これは仏にたいしても、亡くなった人にたいしても、そして僧侶に対しても大変失礼なふるまいです。

お経を読むのは、正しくは、僧侶だけのしごとではなく、法要参加者全員のしごとです。僧侶は法要をリードするコーディネータ（導師）ですが、主役は施主さんであり招待客です。ですから私は、参加者全員にお経の本をくばり、上手下手にかかわらず、一緒に読んでもらうようにしています。

かつて、僧侶は意味の分からぬお経＝呪文を自らの手に握り、それによって人々を精神的に支配してきました。未だに、意味などどうでもいいと考えている僧侶がいるようですが、私たちは、お経を僧侶の専売特許にはなりません。そのためにも、分かりやすいお経を工夫していかなくては。

legi sutron signifas akcepti ilian instruon sur sin kune kun ĉiuj partoprenantoj de koncerna servo. Tio estas kune aŭskulti la sutran instruon. Oni ofte uzas la esprimon, "oferi (donaci) sutron". Sed ĝi estas stranga; devus esti, "sutro estas donacita (al ni)". La Budha instruo estas donacita al ni. Al ni estas dezirate de mortintoj, ke ni renkontu instruon.

Verŝajne multaj pensas, ke legi sutron estas laboro de bonzoj. Ne mankas tiuj, kiuj invitinte bonzon al sia hejmo por peti sutrolegadon, mem ne sidas antaŭ Budha altaro kaj faras privatan aferon en alia ĉambro, kvazaŭ ili pensus, ke bonzo legas sutron laŭ sia volo. Tio ĉi estas tre maldeca konduto al la Budho, al mortintoj, kaj al bonzo invitita.

Legi sutron estas tasko ne nur de bonzo sed de ĉiuj partoprenantoj de servo. Bonzo estas kunordiganto aŭ gvidanto de servo, kaj tie ĉefrolulo estas mastro kaj ĉiuj invititaj gastoj. Tial, kiam mi estas invitita kiel gvidanto, mi disdonas al ĉiuj libreton de sutro kaj instigas ilin kune legi sutron, senkonsidere, ĉu ili povas legi lerte aŭ ne.

Iam bonzoj regadis spiriton de popolo, enferminte sutron nekompreneblan kiel sorĉovorton en sian pugnon. Ankoraŭ nun troviĝas bonzoj, kiuj pensas, ke signifo de sutro ne gravas (ĉar por ili sutro estas sorĉovorto). Ni ne permesu, ke sutro fariĝu monopola posedaĵo de bonzoj. Por tio necesas elpensi facile kompreneblan sutron.